FN PER ANC 47



# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL TRIMONATA BULTENO

N° 53a(nova serio) N° 138a VINTRO 1980

REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE

Eldonita, ekspedita de :

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 10.00 Fr. - Subtenkotizo : ek de 15 Fr.

Nura abono al Normanda Esperanto-Bulteno, sen membreco : 10 Fr.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"




## VIVU LA NOVA JARO !

Al ĉiuj UNE-anoj, kaj aliaj Normandaj Esperantistoj, mi deziras feliĉan jaron 1981 an .

Eĉ ĉiuj flankoj, oni diras ke la mondaj kaj la francaj cirkonstancoj estas malfavoraj . Sed , por Esperanto, mi konstatas ke ĝi, ne sole eltenas,sed kontraùe ĉiam jen postiam progresas, precipe en la ne-Eùropaj landoj, kiel Ĉinujo, Irano, aù Sudameriko .

Ankaù, UNESCO ĉiam estas favora al nia Movado.

Do, ni, Francoj, kaj speciale Normandoj, devas daùre subteni nian pacan lingvon, ĉar la ekstereùropaj novaj Esperantistoj pli kaj pli serĉos apogon apud la malnovaj Esperantistoj, kiuj ni estas, kaj ni ne devas ilin elrevigi .

Jen mia deziresprimo je la komenco de la Nova Jaro !

E. JOUIS


Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais - Dépôt Légal 4ème Trim.80

Le Gérant : P.LEMARCHAND

# DIVERSOJ

## NATURAMIKA ESPERANTO SEMINARIO

Semajnfina progresiga kurso de Esperanto okazos la 11/12 aŭn de Aprilo, en la Naturamika domo de Vaucottes (apud Fecamp) .

Tiu kurso valoras por personoj, kiuj jam posedas antaŭsciojn de 10/15 lernhorojn. Kiu interesiĝas pri tiu staĝo, tiuj bonvolu rilati kun Geesamideanoj MAFFIOLO , 153 rue des Landes, 78400 CHATOU .

## AUSTRALIANO

La pasinta N.E.B. anoncis la atendatan viziton de Samideano el Aŭstralio... Bedaŭrinde, la jam fiksita programo antaŭvidas nur "ektuŝon" de nia provinco : ROUEN havos la privilegion de lia vizito, la 3an kaj 4an de Oktobro venonta ..

## MALAGRABLAĴO

Kiu konas " QUID " ? Tiu franca enciklopedio , vere oportuna, estas tre konata kaj disvastigata en la franclingvaj teritorioj . Ĉiujare, konvena prezento de la Internacia Lingvo honorigas nin, raportante al la publiko koncize, pri Esperanto. Ve ! la ĵus aperanta eldono skribas, post la kutima anonco, kritikon malagrablan rilate al nia lingvo.
Kompetentaj Samideanoj zorgas por taŭga respondo kaj pritrakto kun la eldonisto : jam la rabatservo de Sat-amikaro skribis por protesti . Estus bone ke multaj Esperantistoj sendu kartojn aŭ leterojn al Quid , kondiĉe ke ili estu ĝentilaj : diru vian miron ke libro kia QUID , tiel serioza, povas raporti kritikojn kiujn kelkaj oportunistoj jam prezentis en la jaro ... 1907 !

**REĜKUKA FESTO** okazis en LES ANDELYS , la 18an de Januaro , en la Junuldomo . TESPA-anoj aranĝis la aferon, kaj oni povis ĝui, krom la kuko-regalon, diapo-raporton pri Grekujo .

## A B O N O J

" LA MIGRANTO " mankis, en la kolekto da abonoj prezentitaj en la pasinta numero; la trimonata ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj . Jara abono : 20 F - pago al Gilbert LEBEC , 10 rue Jean Mermoz, 94340 JOINVILLE LE PONT .
Poŝta konto : 10 508 65 A PARIS .

" MONATO" Ni humile petas pardonon pro eraro en la anonce de la jara abono al la magazino : bonvolu legi 115 F ; (tio ja estas malmulte kompare kun la valoro de la gazeto ! )

## K O N G R E S O J

U N E : en Mortain ( vidu anoncon aliloke )
U F E Nacia Kongreso en Perpignan ( 6/6 dum Pentekosto)

SAT-amikaro en Annecy (18/4 - 21/4 )

U E A en Brazilia (25/7 - 1/8 )

SAT en Bazelo ( 1/8 - 8/8 )

o-----o-----o-----o

# VIVO DE LA GRUPOJ

## L E H A V R E

Monataj Kunvenoj

15.11 - Silvia " Le Havre kaj ĝia historio "

Nia urbo ĉiam havis maran emon . Ĝia nomo signifas " havenon" Nun, ĝi posedas novan kaŝnomon : " Oceana Pordo "
Le Havre posedas sufiĉe junan historion ; la haveno ansta - taŭigis enŝlimigitajn marbordojn de la situoj de Harfleur kaj Honfleur . Laŭ dekreto de reĝo Francisko la Unua, la ek-konstruado de la urbo komencis .
Por venigi popolon, la reĝo anoncis ke la Havranoj estas kvitaj je la impostoj de taliaĵo kaj salimposto...
De tiu fama epoko, malmultaj monumentoj atestas pri la pasinta vivmaniero, krom la Katedralo Dipatrino (cetere plurfoje riparita) .... ĉar militoj detruis nian urbon .
Nur stratnomoj rememorigas pri la dinamismo de famuloj aŭ tipaj eventoj de pasinteco.
Laŭ epokoj, la ekonomio kreskis aŭ fuŝiĝis kiam regneco de reĝoj atingis sian finon .La ekvekiĝoj de Le Havre ĉiam komencis kun apogoj komercaj . La ŝiparo pligrandiĝis ; novaj rilatoj transoceanaj konkretiĝis .
La eksterordinara situo de la haveno dediĉis nian urbon al helpo de la landa politiko .
Post rekonstruado de la urbo, multaj atestaĵoj malaperis ,sed retrovu vi vian junecon, kaj ektrovu padon al pasinteco !

Bonan ĉasadon !

20.12 - " Bicikli "

Denove taŭga temo por la nunaj cirkonstancoj : Ŝparo de benzino ! Bona gimnastiko por la sano ! Ekologia solvo por la transporto-problemo ! Jen kelkaj erog diskutindaj .
Unue iom da teknikaj vortoj por esperantlinge pli konatiĝi kun tiu veturilo, kaj iom da historio por konscii pri ĝia juneco, kaj pri la rapido laŭ kiu ĝi atingis sian perfektecon.
Ni poste ĝuis diversajn rememorojn, inter kiuj la rakonton en libro skribita, de Esperantisto franca : " Tra la mondo per biciklo " . Tiu Samideano, inter aliaj aventuroj, traveturis Siberion sur la reloj de fervojo, dank'al persona eltrovo por ekipi sian biciklon . Oni havis ankaŭ plezuron aŭskulti la anekdotojn de nia amiko Roberto, kiu konkludis: " estis la bela epoko ... ... ĉar ni estis junaj ! "

o--------o--------o--------o

Kara Kamarado Forlasis Nin

Kun korpremo, ni sciigas pri la forpaso de S-ano Esperance NOEL , la 15an de Januaro, kiu estis la plej malnova Esperantisto en nia urbo .
Li estis konvinkita je la valoro de la Homo, je la forto de Esperanto por proksimigi kaj klerigi la popolojn, spite al ĉiuj baroj kiuj malhelpas tion .
Li konatiĝis kun la Internacia Lingvo ĉirkaŭ la dudekaj jaroj, kaj de tiam senlace kaj persiste laboris por ĝia disvastiĝo, ĉefe en la laborista medio .
Ni ŝuldas al lia iniciativo la venon de Lidia Zamenhof (1936) kiu sekvigis fortan puŝon de la Movado ĉi tie , tiuepoke .

# VIVO DE LA GRUPOJ

## R O U E N

Vizitoj de Eksterlandaj Samideanoj ...
Dum la pasinta Somero estis akceptitaj, dum unu vespero, kaj iomete veturataj tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo, okaze de vojaĝo en nia lando :

Dum Junio : Lisbet kaj Bertil ANDREASSON, kaj ilia filino 15 jara, kiuj loĝas en Svedujo. Tiuj geinstruistoj haltis en Rouen, antaŭ visito ĉe geamikoj en Bergerac, kie ili vojaĝis en la vulkan-pejzaĝo ĉirkaŭ Clermont-Ferrand .

Dum Julio : David kaj Jean BISSEL kun du gefiloj (13 kaj 14 jaraj) Tiuj Skotlandanoj -li estas bibliotekisto- libertempis en la suda parto de Anglujo, kaj ekskursis en nia lando : dum 2 tagoj en Rouen, kaj 3 en Parizo .

Komence de Oktobro : Marie-Louise kaj Rose-Anne ROOSE ; du Belgaj fratinoj el Bruĝo, loĝurbo de la nuna prezidanto de U E A . Ĉefe interesataj per niaj preĝejoj kaj katedraloj, ili vizitis Amiens, Rouen, Chartres, kaj Parizo . Unu el ili emeritiĝis, kaj la alia estas tradukistino el la Flandra lingvo en la Francan; ankaŭ ŝi estas urba gvidistino en Bruĝo : jen gvidistino kiu valoras por la tuta homaro !

Tiuj vizitoj estis tre agrablaj, kaj ni babilis, interŝanĝante variajn vidpunktojn ...

RUENA GRUPO

o------o------o------o

## Y V E T O T

La Generala Kunveno okazis la 16an de Decembro. Kvankam la protokolo ne estas finpreta, oni povas anonci ke du novaj membroj eniris en la Komitaton : S-ino SALLIO kaj F-ino Line DOMINGO : Koran Gratulon kaj fruktodonan laboron ! S-ro SAUNIER, tre okupata pro familiaj zorgoj, rezignas je sia posteno kiel Kasisto : al li iras la dankoj de la Grupo pro lia longtempa deĵoro en la kasaferoj ... S-ino SALLIO okupas ek de nun tiun postenon .

Oni anoncas ke la tradicia " Reĝkuka Festo" okazos la 25an de Januaro en la M.J.C. Partopreno : 8 F.

o------o------o------o

## L I S I E U X

Dezirante perfektiĝi en la praktika uzo de nia helpa lingvo, kelkaj el la fervoraj Lekzoviaj Esperantistoj kuniĝas ĉiumonate. La renkonto okazas en la Tria-aĝula Klubo " Sainte Anne " . Ĉirkaŭ ok personoj sidas ĉetable ; malpermesate estas "krododili" . Vigla interparolado estiĝas, tiklante la orelojn kaj la scivolemon de la apud-estantoj, kiuj el ĝi , komprenas nur la ridojn !
Post la tagmanĝo sinsekvas anekdotoj, ludoj, kiuj kondukas nin ĝis la kvina horo . Bongusta teo signas la disiĝon . Ĉiu revenas hejmen, kontenta pro la utila kaj agrabla posttagmezo.

Monique MARTHE

o------o------o------o

# Ĝ E N E R A L A   K U N V E N O   E N   M O R T A I N

Pasintjare, kiam temis pri Kongreso en ASNELLES ,ni fanfaronis pro la situo de la aranĝo : " en Sudo de Normandio " ...

Nu ! en 1981, ni retroviĝos en la VERA SUDO de la Provinco ! Kiu loĝas en la nordo, kaj intencas iri piede, tiu preparu , ek de nun, siajn krurojn : la rendevuo havos lokon en MORTAIN .


Fine, la "Sudanoj" ne estos devigataj suferi la egoismon de la " Nordanoj" , kiuj, de pluraj jaroj, preparas la aranĝojn nur en la apudeco de la riverego Sejno !

Mortain situas en la Departemento Manche, 24 km okcidente de Domfront, 40 km oriente de Avranches, 84 km sude de Caen . Kial Mortain ? Tial ke, post traserĉado de niaj Samideanoj el Domfront, Tessy, kaj St Georges du Rouelley, la nura ebleco estas en la Abatejo de Mortain kie, malgraŭ ke ĝi estas funkcianta Abatejo, multaj renkontiĝoj estas organizataj de plej diversaj Grupoj .

Mortain kuŝas en la pitoreska heĝo-kamparo Normanda . Rava turisma regiono ; plaĉa rivero kun akvofaloj : la Granda kaj la Malgranda kaskadoj .

REZERVU LA DATON : 16an kaj 17an de Majo

Organizu vin interne de la Grupoj por veni = petu de feliĉa aŭto-posedanto ke li kunportu vin al Mortain . Se vi mem povas, proponu al viaj grupanoj aŭ lernantoj, lokon en via veturilo : estas pli agrable vojaĝi plurope ol solece ; plie, oni povas ekzerci la lingvon dum la veturado ....




J A M   N U N = Sendu vian Promeson pri Aliĝo al

S-ro Gaston VERON
Place de la Petite Bruyère
61700 - DOMFRONT

# E U R O P A   P A S P O R T O

Oni povas multe paroli pri l'Eùropa Komunumo .
Se la originala ideo estas tre alloga -iri iom post iom al la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eùropo- la realo estas for de la idealo .
Certe, la grandaj pli facile kuniĝis super la limoj ! ili pli facile povas movigi sian produkton laù profito ; se laboristoj strikas en unu lando, ili, sen problemo, sin turnas al fabrikoj de alia lando, kie la laboristoj estas pli ... obeemaj .

Krom tio, la kontaktoj inter la diversaj landoj sin rivelas tre el-revigaj. Kiam -tio kelkfoje okazas- ĉiuj landoj sukcesas starigi kontrakton, oni konstatas ke, rapide, ĉiu zorgas nur por si .

Sed, antaù kelkaj monatoj, la E.K. decidis establi Eùropan Pasporton.
Ĉar tio ne povas havi grandan malhelpon -nuntempe, oni povas vojaĝi en la landoj de la E.K. sen pasporto, se oni ne deziras resti en iu lando pli ol tri monatoj- ,nu, tamen, ekestas malfacilaĵo, ĉiu lando deziranta ke oni uzu, kiel komuna lingvo sur tiun dokumenton, sian !

Ĉar, kompreneble, la Superhomoj de la Eùropa Konsilantaro malscias Esperanton ! Sed"necesas esperi por entrepreni " kaj ni , karaj Gesamideanoj .... NI ESPERAS

Maurice HUET

-=-=-=-=-=-=-=-

## E K Z A M E N O J

La Direktorino de la Ekzamenoj sciigas kun gratuloj, la sukceson al Atesto pri Praktika Lernado de :

S-ino Anne Marie SALLIO
S-ro Albert EVRARD (mencio bone) ambaù el Yvetot .

●———o———o———o

VOUS AVEZ PU LIRE dans ce N.E.B. 138 :

1 - Les Bons Voeux de M. F.JOUIS · "...de tous côtés, on dit que les circonstances sont défavorables. L'Esperanto, non seulement "tient le coup" mais progresse en Chine, en Iran, en Amérique du Sud ..." Il nous rappelle que nous devons constituer l'appui sur lequel comptent les nouveaux Esperantistes .

2 - Des Informations sur des rencontres diverses, et une réclame (non méritée) pour QUID

3 - L'annonce de notre prochain Congrès, qui se tiendra à MORPAIN, les 16 et 17 Mai. Enfin, la Seine Maritime n'a plus le monopole des grandes réunions, et c'est une bonne chose! Nous esperons que les Normands voudront, par leur présence, aider nos Samideanoj, en minorité dans cette région, en participant nombreux à notre A.G. annuelle .

4/5 - La Vie des Groupes .

6 - M.Maurice HUET nous fait part de ses craintes sur l'établissement d'un passeport Européen, pour lequel chaque nation revendique l'utilisation de son propre langage, comme langue commune, sur ce document .

- Résultats d'examens .

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais - Dépôt Légal
Le Gérant : P. LEMARCHAND 4ème Trim. 1980